



## LA BAZAJ TEKSAJ PLEKTOJ

(MARIE BARTOVSKÁ, FRÝDEK-MISTEK, ĈEĤOSLOVAKIO)

Se oni rigardas teksaĵon, oni vidas, ke ĝi konsistas el fadenoj ortangule metitaj kaj diversmaniere interplektitaj. La laŭlongaj fadenoj estas *varpo* (B1a), la laŭlarĝaj estas *vefto* (B1b). La maniero, laŭ kiu estas la fadenoj interplektitaj, estas la *plekto*.

La plekto konsistas el *plekto-punktoj*. Kie *varpero* (varpa fadeno) transiras *vefteron* (veftan fadenon), tie estas *varpa plekto-punkto* (B2a); se *veftero* estas supre kaj *varpero* sube, tiam temas pri *plekto-punkto vefta* (B2b).




La *varpo* kaj la *vefto* kunteniĝas verdire nur tie, kie *varpero* trapasas inter du *vefteroj*, aŭ kie *veftero* trapasas inter du *varperoj*. Tie estas la veraj *ligpunktoj* (B2c). *Liga plektopunkto* estas tiu, kie unu *varpero* transiras unu *vefteron* kaj tuj denove malaperas sub la najbaran *vefteron*; tio estas *liga plektopunkto varpa* (B2a). *Vefta liga plektopunkto* (B2b) estas tie, kie unu *veftero* transiras unu *varperon* kaj tuj malaperas sub la najbaran *varperon*.





Ĉiun plekton oni povas pentri sur *retpapero*, kie la interspacoj inter la vertikalaj linioj prezentas la unuopajn varperojn (B3a); la interspacoj inter la horizontalaj linioj prezentas vefterojn (B3b). La plekton oni desegnas tiel, ke sur loko de varpa plektopunkto oni pleningas nigre la koncernan kvadrateton; la kvadratetoj de la verfaĵaj plektopunktoj restas blankaj. La varperojn oni kalkulas de maldekstre dekstren: maldekstre estas la unua varpero, dekstre la lasta. La vefterojn oni kalkulas de malsupre supren, simile al tio, kiel dum la teksado aldoniĝas la vefteroj: malsupre estas la unua veftero, supre la lasta (B4).

Ekzistas amaso da diversaj plektoj, sed ili ĉiuj estas nur derivaĵoj de tri plektoj bazaj: *tolo*, *kepro* kaj *sateno*.

1/ *Tolo* estas la plej simpla el ĉiuj plektoj. En ĝi alternas po unu plektopunktoj varpaj kaj veftaj same laŭlonge, kiel laŭlarĝe. Ĝi do konsistas nur el plektopunktoj ligaj kaj el ligpunktoj (B1). Tio donas al la tola plekto la avantaĝon, ke tia teksaĵo tre rezistas frotadon kaj ne ŝirmiĝas tiel facile, kiel teksaĵoj kun plektoj pli komplikaj. Bedaŭrinde ĝi rezistas ankaŭ lavadon, pre-



B3



B5


cipe se ĝi estas densa. Se al tio aldoniĝas malfacila lavableco de materialo (ekz. kotono), tiam ĝi prezentas katastrofeton por mastrino.

2/ *Kepro* estas karakterizata per oblikvaj linioj, ascendantaj dekstren aŭ maldekstren. En la baza kepro ĉiu (ekz.) varpero unu vefteron transiras kaj minimume du plujajn subiras; Plua varpero sammaniere transiras duan vefteron, tria la trian ktp., kiel ĝin montras B2. Ek estas do el la *vico* da varpaj ligaj plektopunktoj - oblikva *linio*. Apud ĝi ek estas duvica linio el veftaj plektopunktoj. Ĉar la linioj ascendas dekstren, temas pri kepro dekstra, ĉar sur la supro oni vidas pli multajn vefterojn, temas pri kepro vefta. Sur la suba flanko de la sama teksaĵo oni vidas, kiel aspektas maldekstra varpa kepro.



3/ *Sateno* diferencas de la baza kepro per tio ke ĝiaj ligaj plektopunktoj ne tuŝas sin reciproke (B4). En preta teksaĵo ilin kaŝas la liberaj fadenoj kaj la teksaĵo briletas, precipe se ĝi estas teksita el filamentoj (silko, rajono k.s.). Ekzistas sateno vefta (B4), kie oni vidas nur liberajn vefterojn, kaj sateno varpa - kie oni vidas nur liberajn varperojn (B5).

Desegninte sufiĉe grandan pecon de iu plekto, oni rimarkas, ke post certa nombro da fadenoj (varperoj kaj vefteroj) ripetiĝas la samaj plektopunktoj. En la bazaj plektoj ekestas per tio kvadratoj, kiuj ripetiĝas kvazaŭ transportitaj sur pluan lokon. La kvadratoj estas *riportoj* (B6, B7, B8, B9, B10).



Por krei riporton de la tola plekto, sufiĉas du varperoj kaj du vefteroj; tolo estas plekto dufadena (B6).

Por krei riporton de kepra plekto, necesas minimume tri varperoj kaj tri vefteroj; tiel ekestas kepro trifadena. B7 estas trifadena vefta kepro maldekstra. B2 prezentas trifadenan veftan kepron dekstran. B9 montras sepfadenan veftan kepron dekstran. Teorie povas la nombro da fadenoj en unu riporto de kepro kreski senlime, praktike ĝin limigas la fakto, ke ekestus tro longaj fadenoj liberaj kaj la teksaĵo estus malfirma.

Por krei riporton satenan oni devas havi almenaŭ kvin varperojn kaj kvin vefterojn. Ankaŭ en la satena plekto estas la nombro da fadenoj teorie senlima, sed praktike limigita pro la samaj kaŭzoj kiel kepro. B4 prezentas kvinfadenan veftan satenon, B5 sepfadenan varpan satenon, B10 okfadenan veftan satenon.